

1930/31

VI, 3

# LA NOVA TAGO

LA INTERNACIA BAHAA ESPERANTO-GAZETO

Administracio: Bahaa Esperanto-Eldonejo,  
Weinheim (Baden), Germanujo, Friedrich Vogler-Straße 4  
Poŝtĉekkonto: Hamburg 30376.

La abonprezo por jarkolekto (kvar numeroj) estas gmk. 1,50 aŭ 6 respondkuponoj, por Rusujo kaj Persujo gmk. 2,- aŭ 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro pageblaj laŭ eblo al nia malsupre indikata poŝtĉekkonto.

Represoj kaj tradukoj el „LNT“ estas permesataj, nur oni bonvolu indiki la fonton kaj al ni sendi po du atest-ekzemplerojn. Same ni petas por transsendo de po du ekzempleroj de ĉiuj gazetoj, kiuj enhavas artikolon pri la Bahaa Movado aŭ „La Nova Tago“ por kolekto en niaj arkivoj. Ni rekompence sendos ekzemplerojn de LNT.

---

## KIO ESTAS LA BAHAA MOVADO?

---

La Bahaa Movado celas la starigon de vera religio kaj universala paco inter la homoj. Ĝi komencis en Persujo ĉirkaŭ la mezo de la deknaŭa jarcento, kaj disvastiĝas kun mirinda rapideco, ne nur en la lando de ĝia naskiĝo, sed ankaŭ tra la mondo, en la oriento kaj en la okcidento.

Inter ĝiaj principoj estas jenaj:

1. — Sendependa serĉado de la vero, kaj forlasado de ĉiuj superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj.
2. — La unueco de l'homaro: ĉiuj estas „folioj de unu arbo, floroj en unu ĝardeno“.
3. — La religio devas esti fonto de amo kaj harmonio, alie ĝi ne estas vera religio.
4. — Ĉiuj religioj, en siaj fundamentaj principoj, estas unu tutaĵo.
5. — La religio devas iri mano ĉe mano kun la scienco. Kredo kaj racio devas plene akordiĝi.
6. — Universala paco. La starigo de Universala Ligo de Nacioj, de Universala Arbitracio kaj Universala Parlamento.
7. — Adoptado de internacia helpa lingvo kaj ankaŭ de universala skribmaniero, kiuj estos instruataj en ĉiuj lernejoj de la mondo.
8. — Deviga edukado, precipe por la knabinoj, kiuj estos

# LA NOVA TAGO

## *La internacia Bahaa Esperanto-Gazeto.*

*Redaktoro:* D-ro Hermann Grossmann, Weinheim/Baden (Germanujo).  
— *Kunlaboranta komitato:* Prof. D-ro Auguste Forel, Yverne (Svisujo),  
Heimann Greff, Elbing (Germanujo) / Albert Kimmerle, Heilbronn,  
(Germanujo) / Martha L. Root, New-York (Usono) / Lidja Zamenhof,  
Warsawa (Polujo). — *Lingva kontrolo:* Prof. P. Christaller, Stuttgart  
(Germanujo).

---

Vla jaro

Decembro 1930

N-ro 3

---

## La spirito de l' vero.

Parolado de 'A b d u 'l - B a h a, 1912.

Dum mia vizito en Londono kaj Parizo, lastan jaron, mi ofte interparolis kun la materialistaj filozofoj eŭropaj. La bazo por ĉiuj iliaj konkludoj estas, ke oni akiras konon pri fenomenoj laŭ difinita neŝanĝebla leĝo, — leĝo matematike ekzakta en sia sensa procedo. Ekzemple, okuloj vidas seĝon, tial ne estas dubo pri la ekzisto de la seĝo. La okuloj suprenrigardas al la ĉielo kaj ekvidas la sunon; mi vidas florojn sur tablo, mi flaras ilian bonodoron, mi aŭdas sonojn ekstere ktp. ktp. Tio ĉi, laŭ ili, estas difinita matematika leĝo de perceptado kaj deduktado, kies procedo allasas neniun ajn dubon. Ĉar la universo estas objekto de niaj sensoj, estas tut-evidente, ke ni povas percepti ĝin nur per niaj sensoj.

Tio estas dironta, ke la materialistoj proklamas, ke la peranto kaj gvidilo de la homa ekkonado estas la sensa perceptado. Inter grekoj kaj romanoj la peranto de ekkonado estis la racio; kio ajn estas pruvebla kaj akceptebla de la racio, nepre devas esti allasata kiel vera. Tria gvidilo aŭ peranto estas, laŭ opinio subtenata de la teologoj, la tradicio aŭ profetaj eldiroj kaj interpretaĵoj, kiuj formas la bazon de homa scio. Estas ankoraŭ alia, kvara peranto defendata de la religiistoj kaj metafizikistoj, kiuj diras ke la fonto kaj vojo de ĉia homa enpenetrado en la nekonataĵon estas la inspiro. Koncize do: la kvar perantoj aŭ kriterioj, kiel la homoj deklaras,

estas: unue senŝa perceptado, due racio, trie tradicio, kvarè inspiro.

En Eŭropo mi diris al la materialistaj filozofoj kaj sciencistoj, ke la ekkonado per sensoj ne estas fidinda. Konsideru, ekz. spegulon kaj la bildojn reflektitajn en ĝi. Tiuj ĉi bildoj havas neniun aktualan korpan ekziston. Tamen, se vi estus neniam vidinta spegulon, vi firme insistus kaj kredus, ke ili estas realaj. La okuloj vidas miraĝon super dezerto, ekz. lagon kun akvo, sed estas neniue realeco je ĝi. Se oni staras sur la ferdeko de vaporŝipo, la bordo ŝajnas moviĝi kaj tamen ni scias, ke la tero restas senmova kaj ke ni moviĝas. Oni kredis, ke la tero estas fiksa kaj la suno turniĝas ĉirkaŭ ĝi; kaj kvankam tio ŝajnas esti tiel, la malo estas konata kiel vero. Rapide turnata torĉo igas aperi fajran cirkon antaŭ la okuloj, tamen ni konscias, ke tio estas nur unu lumopunkto. Ni rigardas ombron sur tero, sed ĝi havas neniun materialan ekziston, neniun substancon. Precipe en la dezerto la atmosferaj efektoj produktas iluziojn, kiuj trompas la okulojn. Foje mi vidis miraĝon, en kiu aperis tuta karavano vojaĝanta supren al la firmamento. En la malproksima nordo aperas alia trompa fenomeno kaj mistifikas la homan vidon. Kelkfoje tri aŭ kvar sunoj, nomataj de la sciencistoj „mokaj sunoj“, brilas samtempe, kvankam ni scias, ke la granda sunstelo estas unu sola kaj ke ĝi restas senmova kaj unuopa. Koncize, la sensoj estas daŭre trompataj kaj ni ne povas distingi tion, kio estas kaj kio ne estas reala.

Rilate la duan ekkonilon — la racion, tiu ĉi simile estas nefidinda kaj oni ne povas apogi sin je ĝi. Tiu ĉi homa mondo estas oceano da diversaj opinioj. Se la racio estas la perfekta peranto kaj gvidilo de ekkonado, kial do diferencas la opinioj kaj kial filozofoj malkonsentas unu kun la alia? Tio estas klara pruvo, ke la homa racio ne devas esti fidata kiel senerara kriterio. Ekzemple, grandaj malkovroj kaj proklamoj de antaŭaj jarcentoj estas daŭre renversataj kaj forĵetataj de saĝuloj nunaj. Matematikistoj, astronomoj, sciencistoj de kemio daŭre malpravigas kaj refutas la konkludojn de antaŭuloj; nenio estas difinita, nenio finita, ĉio estas ŝanĝiĝanta, ĉar la homa racio estas progresanta laŭ novaj vojoj de serĉado kaj venanta ĉiutage al novaj konkludoj. En la estonteco estos forĵet-

ata kaj malpravigata multo de tio, kio nun estas proklamata kaj akceptata kiel vero. Kaj tiel daŭros senfine.

Kiam ni konsideras la trian kriterion — la tradicion, kiun la teologoj defendas kiel la peranton de ekkonado, ni trovas tiun ĉi fonton egale nefidinda kaj ne inda de subteno. Ĉar religia tradicio estas raportado kaj enskribaĵoj pri kompreno kaj interpretado de la Libro. Kiuvoje estis akirataj tiuj ĉi kompreno kaj interpretado? Per la analizo de la homa racio. Se ni legas la Libron de Dio, la komprenpovo, per kiu ni formas konkludojn, estas la racio. Racio estas pensoj. Se ni ne estas dotitaj per perfekta racio, kiel ni povas kompreni la signifojn de la Vorto de Dio? Ankaŭ tial la homa racio, kiel jam eldifinite, estas en sia karaktero mem limigita kaj nesufiĉa por konkludoj. Ĝi ne povas ĉirkaŭpreni la Realecon mem, la Senliman Vorton. Ĉar la fonto de tradicio kaj interpretado estas la homa racio, kaj ĉar la homa racio estas erara, kiel do povas ĝiaj konstatoj esti bazo por nia reala scio?

La kvara kriterio, kiun mi nomis, estas la *i n s p i r o*, per kiu laŭdire estas akirebla reala scio. Kio estas inspiro? Ĝi estas enfluo en la homan koron. Sed kio estas la satanaj flustroj, kiuj afliktas la homaron? Ili ankaŭ estas enfluo en la koron. Kiel ni distingu ilin? Aperas demando, kiel ni sciu, ĉu ni sekvas inspiron de Dio, aŭ satanan sufloradon al la homa animo?

Mallonge, la poento estas, ke en la materia homa mondo de fenomenoj estas tiuj ĉi kvar la solaj ekzistantaj kriterioj aŭ vojoj de ekkonado, kaj ĉiuj estas eraraj kaj nefidindaj. Kio do restas? Kiel ni do akiru la realecon de l'scio? Per la spiroj kaj suflorado de la *D i a S p i r i t o*, kiu estas lumo kaj la scio mem. Per ĝi la homa menso viviĝas kaj fortiĝas al konkludoj de vero kaj al perfekta scio. Tio ĉi estas la fina argumento montranta, ke ĉiu uzebla homa kriterio estas erara kaj neperfekta, sed ke la dia gvidilo de scio estas senerara. Tial la homo ne estas prava dirante: „Mi scias, ĉar mi perceptas per miaj sensoj,“ aŭ: „Mi scias, ĉar ĝi estas pruvata de la kapablo de mia racio,“ aŭ: „Mi scias, ĉar ĝi akordas kun la tradicio kaj la interpretado de la sankta libro,“ aŭ: „Mi scias, ĉar mi estas inspirita.“ Ĉiu homa gvido de juĝkapablo estas erara, limigita.

(El la angla lingvo tradukis Vuk Echtner, Praha)

# Homo, Dio, Profeto.

De Lidja Zamenhof, Varsovio (Polujo).

En mallumaj momentoj de krizo; kiam la homaro, kiel aro da blindaj ŝafoj, erarvagas en dezertoj de senvojeco, aperas tiuj, kiuj elkondukas la vojperdintojn el la erarejo, tiuj kiujn ni difinas per la vorto „profeto“. Nevidebla nimbo ĉirkaŭas iliajn kapojn, sonas neaŭdebla muziko, neflareblaj aromoj leviĝas el mistikaj ĝardenoj. Aperas ili en homa formo kaj parolas en la nomo de Dio, admonas en la nomo de Dio, en Lia nomo minacas kaj benas.

Kio estas profeto? Homo, ĉu Dio? Besto el la speco „homo sapiens“, ĉu la Eterna Mistero, enkorpiĝinta en homan formon?

Antaŭe ni pripensu mallonge, kio estas homo kaj kio estas Dio.

Lernante iam biologion, ni eksciis, ke homo konsistas el akvo, karbo, kalko k. t. p. Multaj volas vidi en homo nenion pli, ol pli aŭ malpli perfekte organizitan amason da materio, kiu, kiam difektiĝos io en la organizo, ne pereos vere, ĉar la fiziko instruas, ke la materio ne pereas, sed ensorbiĝos en teron, kreskaĵojn, vermojn, aeron — kaj pereos por ĉiam la konscia homo kun ĉiuj siaj sentoj kaj aspiroj. Malgranda, tre malgranda estus do diferenco inter homo kaj besto, inter Budda kaj vermo, boranta sian vojon sub la tero.

Mi nun rigardas vin kaj vidas personojn diversajn: grandajn kaj malgrandajn. Ĉu mi kredu, ke iu, pezanta, ni diru, 50 kg., estas ekskluzive 35 aŭ proksimume kg. da akvo, proprocia kvanto da karbo kaj aliaj elementoj, ke ni ĉiuj estas nenio, krom tiaspecaj formaĵoj?

Ne — ekzistas io krom materio, io, kio igas nin senti, deziri, suferi, plue io, kio, distingante nin de bestoj, donas al ni intelekton, permesas pensi. „Mi pensas - do mi ekzistas“ - diris filozofo. Ĉu li parolis nur pri la fizika ekzisto de la materio?

Ekzistas do en homo, krom la fizika korpo, io pli sublima, kion oni ne povas percepti per vido aŭ aŭdo, kio tamen,

se nur ni mem tion ne malpermesas, mastras nin, levas super ĉiujn gradojn de ekzisto kaj kvazaŭ faras el ni ponton inter la malsupera mondo de kreitaĵoj kaj la superega mondo de la Kreinto.

Homo estas la plej perfekta en la vico de kreitaĵoj. Ne pro siaj fizikaj ecoj, ĉar kverko vivas pli longe, ol li, leono estas pli forta, ol li, aglo vidas pli bone, ĉevalo kuras pli rapide, hundo havas pli bonan flarsenton. Li superas la regnojn de mineraloj, kreskaĵoj kaj bestoj per io, kion ni ne povas klarigi per matematikaj formuloj nek difini per ĝustaj vortoj, kaj kion ni ĝenerale nomas per la vorto „spirito“.

Homo estas la plej alta, sed nur en la sfero de kreiteco. Kreaĵo estas rezulto de kreo. Kie estas rezulto, devas esti kaŭzo, kie estas kreito, devas esti kreinto. Kaj se eĉ ĉiuj logikaj argumentoj bankrotus, restus ankoraŭ unu — eble la plej forta: tiu sento pri Dio, senkompara en sia ĝeneraleco, tiu senerara, fidela sento, kiun eĉ la materialismo de la lasta epoko ne sukcesis elradikigi.

Kiu Li estas, kaj kie Li estas, tiu Kreinto, kiun ni nomas la Sinjoro de l' mondo, la Unua Kaŭzo, La Ĝenerala Mistero k. t. p., kia estas Lia naturo, kia estas Lia esenco?

Stariĝu antaŭ bildo de Leonardo da Vinci kaj demandu ĝin, kiu estis lia aŭtoro, kiu lin naskis, el kie li devenis. La bildo, se ĝi eĉ scius paroli, ne respondu. Ĝi povus paroli nur pri la genia talento de l' artisto, pri la potenco de lia inspiro, pri lia artista fervoro kaj laboremo, sed nenion pri lia persono. Ĝi povus paroli nur pri la ecoj de la kreinto, ne pri li mem. Ĉar kreaĵo ne komprenas kreinton, kiu estas for ekster ĝi, nur la kreinto havas plenan konscion pri la kreaĵo. Se ni eĉ nenion scius pri la personeco de da Vinci kaj konus nur liajn verkojn, tio tute sufiĉus, por nomi lin geniulo. Artisto esprimas sin per arto, kreanto per kreado.

Kaj ni kaj la tuta mondo, kaj la tuta regno de kreiteco estas atesto pri la Kreinto, kiu doninte ekziston al ĉio, restas mem ekstere kaj super ĉio. Lian esencon ni ne povas ekkoni, ni povas nur ekkoni lin per Lia kreaĵo.

Se ni volas ekkoni gradon de ĝenieco de artisto, ni juĝas laŭ lia plej perfekta verko. Prenu ni do, por ekkoni la Kreinton, lian plej subliman kreaĵon — homon. Kaj ni konsideru ne la fizikan parton de homo, ĉar tiurilate superas lin ofte bestoj, ni konsideru lian spiriton, ĉar ĝuste tiun ĉi spiriton Dio kreis laŭ Sia bildo, similan al Si. Tiu spirito estas kvazaŭ akvo, en kiu respegulas sin ĉio, kio estas apude. Se ĝi fluas kviete sian destinitan vojon, tiam ĝia supraĵo estos kiel spegulo, fidele bildanta la vizaĝojn, kiuj klinas sin super ĝi. Sed se fortaj ventoj de teraj pasioj ondigas ĝian supraĵon kaj baraktigas la akvojn, tiam anstataŭ la spegula portreto sur la malkvietaj ondoj aperos iaj formoj malsimilaj al la rigardanto, ŝirataj, kripligitaj, kiuj kune kun la ondomovo volas kvazaŭ kaŝi sin ie for, malaperi.

Por trovi akvon plej klaran, bildon plej perfektan, ni turnu nin al profeto.

Kio estas profeto? Ĉu li estas nur homo, nur iom pli nobla ol aliaj, aŭ Dio — la Eterna Estaĵo, kiu, forlasinte la sferojn de Sia superegeco, enkorpigis sin en homan formon?

Estaĵo, kiu devas simile al ni ĉiuj, manĝi, trinki, dormi, kiu vivas kun ni, suferas kun ni, parolas nian lingvon, kies manoj kunpremas sin en pugnoj je la ekvido de l'blasfema ora bovido, aŭ sangas sur kruco, tratatitaj per najloj, kies piedoj ŝvelas de feraj katenoj, ĉu tia estaĵo ne estas homo?

Sed estaĵo, kiu elkondukas el la lando de mallibero aronda sklavo kaj fine altigas ilin super ĉiujn tiutempajn naciojn, filo de ĉarpentisto, kiu eĉ, agoniante forlasita sur kruco, sur la ruinoj de malnova civilizacio konstruas novan, simpla, neinstruita kamelisto, kiu, persekutata de ĉiuflankaj malamikoj, instruas, klerigas kaj civilizas siajn sovaĝajn samgentanojn, ekzilito el princa familio, kiu, kondamnita je tutviva mallibereco en unu el la plej teruraj malliberejoj de l'mondo, ne rompiĝas, sed kun majesto kaj potenco de senmorta reĝeco admonas kaj avertas la reĝojn de la tero kiu el trans dikaj, nepenetreblaj muregoj inspiras siajn malproksimajn disĉiplojn kaj el la mallumejo ĵetas en la mondon radiojn de la Nova Tago — ĉu tiaj estaĵoj ne estas io pli, ol homoj?

En malvarma, malluma spaco rondiras nia planedo. Ie, malproksimege fajras giganta globo, la suno. La suno restas en sia loko,



kaj la tero ne forlasas sian vojon. Nenia kontakto estus inter la du astroj kaj ĉiam restus nia tero malluma kaj malvarma, se tra la mistera etero, tra regionoj de absoluta malvarmo la suno ne sendus al ĝi siajn radiojn. Tiel okazas en la mondo de l'naturu kaj tiel okazas en la mondo de la spirito. La Eterna Fonto de la spirita lumo kaj varmo estas en sferoj neimageblaj por ni, kaj malluma estus nia mondo, se el tiu Fonto ne venus al ni oraj radioj, kiuj varmigas, lumigas kaj donas al ni spiritan vivon. Kiam ni eniras en sunlumigitan ĉambron kaj kontente konstatas, ke la suno estas tie, ĉu ni komprenas per tio, ke la giganta astro forlasis sian lokon kaj transloĝiĝis en nian malgrandan ĉambreton? Ne, ĝi restis, kie ĝi estis, kaj al ni venis nur ĝia sendito — radio. Sed tiu radio alportas al ni tion, kio estas en la suno plej esenca — lumon kaj varmon. Tia suna radio en la spirita mondo estas profeto.

Kaj profeto estas kiel luno. Ĝi ĵetas sur la teron brilon, sed ĝia brilo ne estas de ĝi mem. Ĝi sendas teren nur tion, kion ĝi mem de la suno ricevis. Mi ne povas ne citi ĉi tie la vortojn de Kristo, kiu parolante pri la venonta Spirito de la Vero, diris: „li ne parolos de si mem, sed kion ajn li aŭdos, tion li parolos“.

Do profeto ne estas Dio, ĉar Dio ne eniras homan korpon, kiel suno el sia altaĵo ne eniras nian ĉambron. Li estas nur rebrilo de tiu grandega vivodona astro, lie estas nur eĥo, portanta al niaj oreloj la sonojn de la muziko de eterno.

Stariĝu en arbaro aŭ montaro kaj ekkriu „mi“. La arboj kaj la rokoj eĥe ripetos: „mi!“ kaj portos vian voĉon tien, kien ĝi mem ne atingus. Ĉu tio signifas, ke la arboj kaj rokoj false vokas, ke ili trouzas ies vorton? Ne, post la ripeto de arboj kaj ŝtonoj estas ĉiam la voĉo de l' vokinto — ne ili, sed li parolis.

Kaj kiomfoje profeto en sia parolo diras „Mi“ kaj en skribaĵo tiu pronomo komencas sin per majusklo, tiam li ne parolas en sia nomo, nek pretendas esti Dio. Li estas nur obeema eĥo, kiu ripetas, kion ĝi aŭdis.

Tiamaniere en profeto ni distingas du elementojn: la homan kaj la Dian. Profeto-homo naskiĝas, suferas kaj mortas,

kaj jarcentojn aŭ jarmilojn post li venas alia profeto-homō. Kaj kvankam tiu alia aperas en alia lando kaj tempo, parolas alian lingvon, tamen nur lia homa elemento estas nova. La Dia Radio, kiu lumis el la malnova torĉo, restas tiu sama, kvankam en nova lampo. Per nova buŝo parolas la Malnova Voĉo, la Eternan Muzikon ludas nova instrumento. Se la voĉo, la melodio estas la samaj, ĉu gravas la alieco de l' buŝo, de la instrumento? Se la instruo estas tiu sama, ĉu gravas, ke nova instruisto ĝin predikas?

Sed kelkaj riproĉos, ke la instruoj ne ĉiam estas la samaj. Ni prenu, kiel ekzemplon, lernejon.

En la prepara klaso infano ekscias, ke du kaj du estas kvar. Ĉu en la sekvanta klaso tiu scio estas ŝanĝita? Ne, nur riĉigita. Se anstataŭ longa sumado de samaj nombroj instruisto postulas konforman multiplikon, tio ne estas ŝanĝoj nur progreso. Se anstataŭ malfacila multiplikado de mul cifera, nombroj, instruisto prezentas sistemon de logaritmoj, ĉu tio ĉi estas kontraŭ la antaŭe ekkonitaj reguloj? Tiel same en la esencaj instruoj de profetoj ne ekzistas kontraŭecoj; unu estas nur progresigo de antaŭaj kaj ĉiu profeto estas edukisto, instruanta laŭ la programo de unu Superega Edukestro Kelkfoje la programoj de diversaj lernejoj povas eĉ iom diferenci inter si, la programo povas esti pli humanista aŭ pli reale, pli teoria aŭ pli praktika. sed tio dependas de kapabloj de la edukatoj, de iliaj postaj profesioj, de la bezonoj de l' socio, en kiu ili vivas, kaj saĝa estas tiu edukestro, kiu ne senmovigas la programon, sed diversigas ĝin laŭ necese. La celo estas ĉiam la sama: eduki klerajn homojn kaj bonajn socianojn.

Kaj ne ekzistas efektiva diferenco inter la instruoj de diversaj profetoj. Ĉiuj ili estas portantoj de unu evangelio, radioj de unu suno, eĥoj de unu voĉo kaj kantas ĉiam la saman kanton.

La ĉefmotivo de tiu kanto estas Amo. Kristo, demandite, kiu ordono de la leĝoj estas la plej grava, respondis: „Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso“ Kaj li aldonis la duan: „Amu vian proksimulon, kiel vin mem“, Amon instruas Budda, kaj Baĥa'u'llah prezentas ĝin kiel kialon kaj celon de

kreo, ĉar jen Dio diras per lia buŝo: „Vualita en Mia nememor-  
ebla esteco kaj en la pratempa eterneco de Mia esenco, mi  
sciis Mian amon por vi; tial Mi kreis vin, bildis en vi Mian  
bildon kaj malkaŝis al vi Mian belon.“ La kondiĉo de tiu amo  
estas reciprokeco kaj Li diras: „Amu Min, por ke Mi vin amu.  
Se vi Min ne amas, neniam atingos vin Mia amo.“ Kaj per-  
fekta, malegoista devas esti tiu amo: Se Min vi amas, turnu  
vin for de vi mem, kaj se Mian kontentecon vi serĉas, ne zorgu  
la propran, por ke vi mortu en Mi kaj Mi vivu eterne en vi“.  
Ĉu ne tiun saman sinoferon instruis Kristo dirante: „Kiu ne  
prenas sian krucon kaj ne sekvas post Mi, tiu ne estas inda  
je Mi. Kiu trovas sian vivon, tiu ĝin perdos, kaj kiu perdas  
sian vivon pro Mi, tiu ĝin trovos.“

De nia materia mondo jam delonge malaperis la grandaj  
profetoj de l'pasinteco. Sed nur la profetoj-homoj malaperis.  
Ĉielo kaj tero forpasos, sed iliaj vortoj ne forpasos. La Dia  
Inspiro, kiu parolis per la buso de ĉiu el ili, ne mortis, sed,  
kiel Fenikse, renaskiĝas ĉiam el la propraj cindroj. Jen en la  
hodiaŭa tago denove eksonis ĝia kanto. Kiu havas orelojn,  
tiu aŭskultu.

(Parolado farita okaze de la bahaa fak-kunveno je la XXII-a  
Universala Esperanto-Kongreso en Oxford (Anglujo), la 8-an  
de aŭgŭsto 1930.)

30 5 ✓

### Justeco. \*)

En la malgranda libreto „Kaŝitaj Vortoj“, en kiu Baha'u'llah mallonge prezentas la esencon de la profetaj instruoj, lia unua konsilo rilatas al individua vivo: „Havu bonan puran kaj lumradian koron.“ La sekvanta montras la ĉefprincipon de vera socia vivo: „Super ĉio plej amata de Mi estas Justeco. Ne malatentu ĝin, se vi Min deziras. Per ĝi vi ricevos la forton vidi per la propraj okuloj, kaj ne per okuloj de aliaj homoj, kompreni per la propra kompreno, kaj ne per kompreno de iu ajn en la mondo!“

La plej nepra kondiĉo de socia vivo estas, ke individuoj iĝu kapablaj distingi veron de malvero kaj bonon de malbono

\*) El la libro de D-ro John E. Esslemont „Baha'u'llah kaj la nova epoko“, el la angla lingvo tradukita de Lidja Zamenhof, kiu ĵus aperas en la Bahaa Esperanto-Eldonejo.

kaj vidi ĉiujn aferojn en ĝusta lumo. La plej grava kaŭzo de spirita kaj socia blindeco kaj la plej granda malamiko de socia progreso estas egoismo.

Baha'u'llah diras:

„Ho filoj de intelekto! Maldika palpebro malhelpas okulon vidi la mondon, kaj ĉion, kio estas en la mondo. Pensu do, kio sekvas, se la kurteno de avido kovras la vidon de koro!“

„Ho homoj! la mallumo de avido kaj envio malheligas la lumon de l'animo, kiel nuboj malhelpas trapenetron de la sunaj radioj!“ (Tabuleto al kelkaj persaj zoroastranaj bahaanoj.)


Longa sperto konvinkas fine homojn pri la vereco de la profetaj instruoj, ke egoistaj konsideroj kaj egoistaj agoj alportas neeviteblan socialan malfeliĉon, kaj por ke la homaro ne pereu malglore, ĉiu devas konsideri aferojn de sia najbaro egale gravaj, kiel siajn proprajn kaj subordigi siajn proprajn profitojn al tiuj de la tuta homaro. Tiamaniere bezonoj de ĉiu kaj ĉiuj estos fine plej bone kontentigitaj.

„Ho filo de homo! Se vi priatentas favoron, ne konsideru tion, kio utilas al vi mem, sed alkroĉu vin al tio, kio utilas al viaj proksimuloj. Se vi priatentas justecon, elektu por aliaj tion, kion vi elektas por vi mem.“ (Baha'u'llah, Vortoj de l'paradizo).

## Nia bahaa fakkunveno je la „Dudekdua“ en Oxford (Anglujo).

La universala Esperanto-kongreso ĉiujare signifas kunvenadon de homoj el la plej diversaj kontinentoj, el la plej diversaj landoj, rasoj, klasoj kaj religioj, fortan unuiĝadon de multaj pensoj, la plej bonaj kaj noblaj de nia tempo. Universalaj Esperanto-kongresoj signifas laboron, kunlaboradon inter la popoloj, signifas vojojn al atingeblaj celoj. Pro tio estas tutkompreneble, ke en tiuj kongresoj la bahaa movado estas reprezentata, ke okazas bahaaj fakkunvenoj, kiuj estas troveblaj sur la kongresprogramoj inter la oficialaj komunikoj. Kelkiuj el la amikoj jam partoprenis tiajn fakkunsidojn, portantaj la mondampleksantajn ideojn de la bahaa instruo malproksimen en la plej diversajn landojn.

Ĝum pluvema tago en malnovĝa, inda prelegsalono de unu el la universitatkolegioj okazis en tiu ĉi jaro je la 4a de aŭg. en Oxford la kongresa bahaa fakkunsido. Ĉiuj sidlokoj estis okupataj. Profesoro P. Christaller el Stuttgart (Germanujo), unu el la membroj de la Lingva-komitato de Esperanto kaj komplezema kunlaboranto por la bahaa Esperanto-gazeto „La Nova Tago“, prezidis la kunvenon kaj malfermis ĝin kun varmaj vortoj. Lidja Zamenhof el Varsovio (Polujo), la filino de nia majstro, parolis pri „Dio, Homo kaj Profeto“. La vortoj de la mond-lingvo, vere majstre parolitaj de ŝi kaj levitaj al arta perfekteco, fariĝis akordoj harmoniaj de pura spirita muziko, kiun prezentis ŝia parolado. La suno trapenetris la pluvajn nubojn kaj sendis kelkajn varmajn kaj brilajn radiojn tra la malnovaj fenestroj kaj en la Spaco de „Christ-Church-College“ regis en forta ritmo la spirito de nova, bonaŭgura homar-epoko.



*Christ Church, la kun-  
venejo de la bahaa  
fakkunveno je la  
Dudekdua en Oxford.*


Mary Hanford Ford el New York (Usono), poste parolis pri „La signifo de la bahaa instruo por nia tempo“ kaj Elsa Maria Grossmann el Hamburg (Germanujo), pri „La bahaa instruo kiel interna spirita ponto inter la popoloj“. El la postulitaj respondoj al diversaj demandoj de la aŭskultintoj post la kunveno kaj el la vigla vendo de libroj rezultis, ke la fakkunsido trovis grandan ĝeneralan komprenon kaj intereson.

La 13an de aŭg. ankoraŭ okazis bahaa kunveno en Londono en la Bahai Reading Room, Walmar House, 288, Regent Street, kiu estas la kunvenejo de la londonaj bahaanoj. Ankaŭ ĉi tie pleniĝis la salono ĝis la lasta sidloko. Lidja Zamenhof kaj Elsa Maria Grossmann parolis al la amikoj kaj Evelyn Baxter (Londona

bahaanino) raportis pri la Esperanto-kongreso en Oxford. La ĉeestintoj sekvis al la diversaj referantoj kun eksterordinara intereso, kaj pluraj el ilia rondo, kiuj ĉi tie aŭ en Oxford la unuan fojon ekaŭdis ion pri la baha instruo esprimis sian varman simpatian kaj el iliaj vortoj oni povis konkludi, ke la baha instruo devos plenumi grandan taskon en la evoluo de la hodiaŭa epoko por la tuta homaro. Longe post fino de la kunveno la ĉeestintoj disiĝis, kaj se Londono ne estus tiel grandega urbo kaj la distancoj en ĝi ne tiel vastaj, la demandoj ankoraŭ longtempe estus daŭrigitaj.

(Esperantigis Aki, Heilbronn.)

## El Japanujo.



### *Seikei Esperanto-grupo kaj bahaaj amikoj.*

Nia baha amikino Agnes Alexander (\*) sendis al ni la supran fotografajon kaj skribis:

La 15an de junio la studentoj de Seikei-gimnazio havis ekspozicion en ilia lernejo, parto de kiu estis Esperanto. En la Esperanto-programo la unua parolanto estis Dr. Asajiro Oka, eminenta esperantisto kaj membro de la Imperia Akademio de Japanujo. Lia temo estis „La Internacia Epoko“. Poste mi parolis esperante pri la instruoj de Baha'u'llah, kaj unu el la Esperantaj studentoj tradukis japanen.

En la centro de la Esperanta elmontra cambro trovis verdan arbon de kies pinto flagrubandoj kun ĉiuj koloroj etendiĝis. Sur la piedo de la arbo estis skribita, „Mondpaco“.

En la —4a de aŭgusto la XVIII kongreso de japanaj esperantistoj de Japanujo okazis ĉe Kanazaŭa, malnova urbo proksima al la norda limo de Japanujo, kie mi feliĉe partoprenis. Unu el la partoprenantoj estis juna franco, kiu vojaĝis sur biciklo nomata, „Esperanto“ de Eŭropo.

Mi ĝojas ke baldaŭ ni povos havi la libron „Baha'u'llah kaj la nova epoko“ de D-ro J. E. Esslemont, tradukita japanen.

## Kun Martha Root en Persujo.

Pri la vizito de nia al Esperantistoj bonkonata bahaa amikino kaj Esperanto-propagandistino Martha Root en Persujo raportis cirkulero de niaj amikoj en Teheran:

Ĉiuj bahaanoj, kiuj de jaroj jam aŭdis pri la brilaj servadoj de tiu ĉi spirita kaj purkora servistino de Dio, kiuj ŝin sopirege atendis, estis tre feliĉaj, kiam realiĝis ilia sopiro. Estis la 21a de jan. 1930, kiam regis la plej granda ĝojo inter la amikoj pro la renkontiĝo de Miss Martha en ilia rondo.

Kvar amikoj, inkluzive Jenabi Fazel de Mazenderan, iris de Teheran ĝis Kazvin, kio estas distanco de pli ol 70 mejloj, por bonvenigi la amatan fratinnon. Granda nombro da amikoj ankaŭ iris ĝis Karaj, kio estas la duona vojo inter Teheran kaj Kazvin. Estis la 21a de januaro, kiam nia kara gasto alvenis en Karaj, kie ŝi plej kore kaj entuziasme estis akceptata de la amikoj. Post mallonga halto kaj pluraj fotografadoj, Miss Martha iris al Teheran, akompanite de ĉiuj, kiuj iris renkonti ŝin. Ŝi enloĝiĝis en la Grand Hotel, kie antaŭe estis aranĝitaj la necesaj oportunaĵoj por ŝi. La areto manĝetis kun ŝi en la hotelo, kaj la amikoj estis ravitaj, havi tiun ĉi longe atenditan, spiritan fratinnon inter si. Ne estas eble per vortoj priskribi la grandegan ĝojon kaj sincerajn sentojn de la amikoj, kiuj ĉeestis la manĝadon. Ili ĉiuj estas atestantoj, ĉar ili vidis per propraj okuloj, ke la Diaj promesoj de Baha'u'llah realiĝas, ke universala paco, unueco de la homaro, rezigno de malunuiĝo estas la vera unuiĝo inter oriento kaj okcidento. Estas privilegio por amerikana sinjorino, viziti Persujon, la sanktan landon de Baha'u'llah, kie miloj da animoj oferis siajn vivojn por la disvastigo de la universala paco, kaj por vidi la bravajn kaj kuraĝajn anojn de tiu ĉi granda instruisto. Laŭ peto de la „Moratteb“-Komitato, kiu prizorgas la administracion de la publikaj kunvenoj, disponigis sin Miss Martha Root, post dutaga ripozo, partopreni grandajn publikajn kunvenojn, kiuj precipe estis fiksitaj por ŝi. En ĉiuj kunvenoj regis dum la tuta tempo la spirito de amo kaj sincero. Miss Root faris mirinde belajn paroladojn entuziasmigajn, kiuj estis tradukataj de Mirza Valiullah Khan Vargha kaj du aliaj persaj kredantoj. En ĉiu kunveno okazis malonga alparolo aŭ angle aŭ Esper-

ante, por bonvenigi Miss Root kaj ŝin konatigi kun la aŭskultantaro. Kiel fino de la kunvenoj estas kantitaj kantoj. La belaj paroladoj, kiujn faris nia amata fratino, estis tiel vivigaj, ke la koroj de la entuziasmaj aŭskultantoj estas plenigitaj per ĝojo kaj feliĉeco.

Miss Root intencas, skribi libron pri sia vizito en Persujo kaj la impresoj de tiu ĉi lando. Ne ekzistas ia dubo, ke tiaj amikoj de la okcidento, kiuj fervore penas, viziti la landon de Baha'u'llah, kaj kiuj volonte pli aŭdus pri la staĝo en tiu ĉi lando, post la legado de la libro de Miss Root ne hezitos, veni al Persujo. Ĝis tiam estos trovataj pli taŭgaj vojoj por la vekigo de la kompreno al kunlaboro kaj helpo inter oriento kaj okcidento kaj por la universala paco kaj unuiĝo de la homa gento.

Unu el la plej entuziasmigaj novaĵoj, kiujn sciigis al ni Miss Root, estas ŝia vizito ĉe pluraj profesoroj kaj scienculoj de la germanaj universitatoj. Miss Root pensas, ke la germanoj sammaniere, kiel ili estas konataj pro siaj precipa kaj profunda precizeco kaj pleja zorgemo, per kiuj ili studas ĉiujn demandojn, ankaŭ speciale studas la leĝojn kaj principojn de nia afero kaj fervore penadas, ricevi bahaan literaturon, por ĝin studadi en ĝia originala lingvo. Ŝi esperas, ke Germanujo akceptos la aferon kaj pli rapide disvastigos la principojn bahaajn ol aliaj landoj de Eŭropo, ke Germanujo estos la unua lando en Eŭropo, kiu plenumos la profetaĵon de 'Abdu'l-Baha, ke unu popolo en la okcidento utiligos la sunradiojn reflektante ilin al la oriento kun pli granda viveco kaj forto.

Precipe akcentis Miss Root la necesecon, ke la persaj instruistoj, kiuj intencas vojaĝi Eŭropon, lernu Esperanton, ĉar ĝi estas bona ilo, per kiu oni facile povas kontakti kun diversaj asocioj kaj unuiĝoj, por doni la bonan sciigon al fervoraj aŭskultantoj. Ĉar ŝi mem estas aktiva Esperantistino, ŝi trovis ĝin tre utila, ĉar ŝi havis la ŝancon, interrilati kun multaj scienculoj kaj asocioj en Eŭropo.

Sekvinte al invito de la amikoj en Reŝt (Persujo) Miss Root iris tien je la 4a de marto 1930, akompanita de Ahmed Yezdani kaj kelkaj aliaj amikoj de tiu urbo, kiuj venis al Teheran, por venigi ŝin al Reŝt. La aro kunvenis ekstere de



Kasvin, alvenis tie malfrue vespere kaj iris la alian matenon al Reŝt, akompanita de Mirza Yusuf Khan Wahid Kahsfi, kiu estis elektita, esti la interpretisto de Miss Root dum tiu ekskurso, kaj de kelkaj aliaj amikoj el Kasvin.

Granda nombro da amikoj de Reŝt renkontiris ĝis 6 mejloj antaŭ la urbo, por akcepti Miss Root. Post mallonga halto kaj diversaj fotografadoj, la aro daŭrigis sian vojaĝon, alvenis en Reŝt kaj iris tie en hotelon.

Por la sama vespero estis aranĝata granda kunveno en „Hazirat-ul-Quda“ (bahaa administracia centro), kaj Miss Root faris mirinde belan paroladon antaŭ la fervora kaj entuziasma aŭskultantaro. Ŝi rakontis tiel bele kaj flue, ke la ĉeestantoj estis tuŝitaj profunde en la koroj.

En la alia tago okazis 4 kunvenoj en la bahaa centro antaŭ ne malgranda nombro da kredantoj.

La 8an de marto 1930 Miss Martha faris ekskurson al Pahlavi — haveno ĉe la Kaspia maro proksime al Reŝt —, akompanita de sia interpretisto kaj kelkaj aliaj amikoj. La amikaro iris en la domon de bahaano, kie estis fiksitaj 2 kunvenoj por la anoj de Pahlavi.

La vizito de tiu ĉi amata fratino ĉe la amikoj en Reŝt kaj Kasvin estigis mirinde belajn rezultojn. Ni devus pagi altan tributon al la sincereco kaj spirita naturo de tiu ĉi mirinda animo, kiuj — ni dirus — estas la plej nobla mistero de la sukceso en ŝia nobla tasko. Ŝi malŝparas ne unu minuton de sia tempo, sed ĉiam penas, iamaniere servi al la afero; ŝi juĝas precize. Ŝi ne pensas pri mondaj aferoj, sed pli preferas servi al la afero ol vivadi komforte en lukso. Esperantigis Aki, Heilbronn.

## Brilaj momentoj ĉe la „Dudekdua“.

Dum longaj monatoj ni atendis la „XXII-an“ — do ni ofte memoru la ĉefajn okazintaĵojn de tiu ĉi kongreso. Ĉu iu el ni povus forgesi la tutkoran bonvenon de niaj britaj samideanoj ĉu ĉe la havenurboj ĉu ĉe la londonaj stacioj? aŭ de la oxfordanoj eĉ ne-esperantistaj? Je nia alveno en Oxfordon salutis nin la verda standardo kiu flirtis super la Urbdomo — nia multvizitota akceptejo kaj kunvenejo. Esperantaj tekstoj invitis la kongresanojn aĉeti vestaĵojn, manĝaĵojn, ĉokoladojn k. t. p.; ĉiutagaj ĵurnaloj faris bonegajn raportojn kun foto-grafaĵoj pri kongresaj interesoj kaj aferoj.

Brila estis la urbestra gastigo sabaton vespere, kiam akceptis nin unuope du geĉefkonsilantoj de Oxfordo anstataŭ la urbestro mem kiu forestis. Gaja estis la bela halo per floroj, esperanta kaj ĉiujnaciaj flagoj: gaja estis la ĉeestantaro, pli ol 1200 el 30 landoj. Post koraj bonvenaj paroladoj finis impona gastig-kunveno per kantado de l' brita nacia himno kaj de l' internacia „La Espero“.

Dimanĉon okazis du gravaj di-servoj. Tagmeze fotografiĝis la kongresanaro en angulo de la kortego de Christchurch Kolegio, kaj vespere je la 7 30 la kongresa inaŭguro okazis. Salutis la kongreson por siaj registaroj kelkaj reprezentantoj, kaj por la Esperanto-movado en siaj landoj kelkaj gesamideanoj. Finis longa, entuziasma kunveno per kunkantado de „La Espero“.

London — nun komenciĝas la labortagoj! Dum la semajno okazis 3 laborkunsidoj de la Esperanto-movado kaj la ferma kunsido de la kongreso; unu de la Universala Esperanto Asocio antaŭtagmeze, kaj 3 kunsidoj de la Somera Universitato kaj multaj malgrandaj (tamen sufiĉe gravaj) fakkunvenoj en la post-tagmezoj.

Ĉe la unua labor-kunsido prezidis s-ro Merchant (Anglujo) kaj salutis reprezentanto de francaj inĝenieroj. La prezidanto priskribis la tutjaran laboron de la Internacia Centra Komitato, kaj detale raportis la sekretario s-ro Kreuz. Ĉe la dua kunsido la sekretario legis salut-leterojn, inter ili unu de Shoghi Effendi el Haifa por tutmondaj bahaanoj.

Kiel gravaj, samtempe kiel ĝueblaj estas la internaciaj Someraj Universitato-kursoj, precipe ĉi tiun jaron, kiuj pritraktis muzikon de Mozart, internaciecon en la vortaro, elementojn de eŭropaj vortoj, kaj evoluon de nia poezio. Samtempe okazis fak-kunvenoj, ekz. policanoj, stenografistoj, blinduloj, instruistoj, pacifistoj, scienculoj, virinoj, farmacistoj kaj nia bahaa kunveno. Kompreneble ne ĉiujn oni povis ĉeesti — kian elekti? — jen problemo por kongresano!

Tamen ne ĉio estis seriozaĵo! La belaj antikvaj kolegioj allogis: tri fojojn ĉiutage kondukis anaron Sro Bernard Clarke. Ho trankvilaj kortegoj, mirindaj herbejoj, belegaj ĝardenoj kiam ni revidos vin? Ho pintaj turoj, grizaj muroj, grandaj haloj, kiel ofte vi reaperos al nia memoro!

Krom tiuj dumtagaj distraĵoj okazis ĉiu-vespere iu amuz-aĵo koncerto ĉe kiu ludis, kantis kaj dancis diversnaciaj gesamideanoj kaj laste la grandioza balo kiu denove plenigis la grandan halon kaj ĝojigis ĉies korojn.

Sabaton la kongreso fermiĝis sub la gvidado de nia amata prezidanto s-ro Merchant. Lastfoje oni kantis „la Esperon“, kaj la espero estas „En Krakovo“

„Kongresano 94.“

la patrinoj kaj la unuaj instruantoj de la venonta generacio.

9. — Ĝegalaj ebloj por disvolviĝo, same egalaj rajtoj kaj privilegioj por ambaŭ seksoj.
10. — Ĉiuj devas labori, ĉu riĉuloj, ĉu malriĉuloj. Laborado laŭ spirito de servemo estas Di-servo.
11. — Forigo de la ekstretoj de riĉeco kaj malriĉeco. Zorgo pri la bezonuloj.
12. — Konfesado de la unueco de Dio kaj obeemo al Liaj ordonoj.

## Kiel ĝi devenis?

Ĝia antaŭulo estis junulo nomita la BAB (tio signifas la Pordo) kiu, en 1844, antaŭsciigis pri baldaŭa alveno de iu pli granda ol li mem, kiu inaŭguros novan epokon en religio kaj civilizacio. Post ses jaroj de nobla kaj memofera penado li estis martirigita en la frua aĝo de tridek-unu jaroj.

Ĝia fondinto estis BAHĀ'U'LLĀH (tio signifas La Gloro de Dio) kiu, antaŭ pli ol sesdek jaroj, difinis la principojn de la movado kaj proklamis sin kiel tiu, kies alveno estis antaŭdirita de la BAB. Kiel lia antaŭulo li estis forte kontraŭstarata kaj kruele persekutata. Dum kvardek jaroj de ekzilo kaj mallibereco li estis precipe okupata per skribado aŭ diktado de siaj verkoj kaj per edukado al siaj sekvuloj. Lia lasta ekzilejo estis 'Akká, en Palestino, kie li forpasis el la mondo, en 1892, sepdekvar-jara.

Ĝia klariganto kaj disvastiganto estis 'ABDU'L-BAHA (tio signifas Servanto de Dio), filo de BAHĀ'U'LLĀH, kiu estis difinita de sia patro kiel la centro al kiu ĉiuj bahaanoj sin turnu por gvidado. 'ABDU'L-BAHA estis la intima kunulo kaj konstanta helpanto de sia patro en kies ĉiuj suferadoj li partoprenis. Li restis malliberulo ĝis 1908, kiam la malnova reĝimo en Turkujo finiĝis, kaj ĉiuj religiaj kaj politikaj malliberuloj en la imperio estis liberigataj. Post tiu dato li loĝis precipe en Palestino, sed vojaĝis multe en Egiptujo, Eŭropo kaj Nord-Ameriko senĉese instruante, klarigante kaj ekzempligante la principojn de la movado, inspirante kaj gvidante la konduton de siaj amikoj kaj sekvantoj tra la mondo.

Li forpasis en 1921 en la aĝo de sepdek-sep jaroj. Li testamente difinis sian plej maljunan nepon, Shoghi Effendi, kiel la unuan gvidanton de la movado, ankaŭ li postlasis instrukciojn por la elekto de Internacia Konsilantaro, bazita nerekte sur universala voĉdono de la kredantoj, kiu en la estonto gvidu la evoluon de la movado.

LITERATURO PRI LA BAHAA MOVADO  
EN ESPERANTA LINGVO

havebla ĉe la

**Bahaa Esperanto-Eldonejo**

Weinheim (Baden), Friedrich Vogler-Straße 4

(Germanujo) Poŝtĉeka konto: Hamburg 30 376



1. D-ro John E. Esslemont: **Baha'u'llah kaj lia misio.**  
Prezo: gmk. 0.50 = 2 respondkuponoj.
2. D-ro Hermann Grossmann: **La esenco de l'Bahaismo.**  
Prezo: gmk. 0.25 = 1 respondkupono.
3. Baha'u'llah: **Kaŝitaj vortoj.** Admonoj, paroloj kaj preĝoj, el la persa originalo tradukitaj.  
Prezo: gmk. 0.40
4. Martha L. Root: **Bahaaj pruvoj de vivo post morto.**  
Prezo: gmk. 0.25 = 1 respondkupono.
5. D-ro Ernst Kliemke: **Bahaismo kaj politiko.**  
Prezo: gmk. 0.25 = 1 respondkupono.
6. —9— **Kompilajo de bahaaj vortoj.**  
Prezo: gmk. 0.20.
7. **Fotografajo de 'Abdu'l-Baha.**  
Prezo: gmk. 1.— 4 respondkuponoj.



**NACILINGVA BAHAA LITERATURO**

en **angla lingvo** de The Bahá'í Publishing Committee,  
P. O. Box 348, Grand Central Station, New York City (Usono).

en **germana lingvo** de Verlag des Deutschen Bahá'í-  
Bundes, Stuttgart (Germanujo) Alexanderstraße 3.